

# Internacia Fervojisto

Dumonata organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF)  
revuo pri fervojo



ISSN 1397-4270

## 2021.2

La reloj ligas la landojn – Esperanto la popolojn



IFEFF - „retkunvenejo“

## Estimataj gelegantoj

Jam pasis unu jaro dum kiu ni batalas kontraŭ nova virusa epidemio. Estas nekredeble, ke tiel malgranda, nevidebla „io” faras tiel grandajn problemojn. Ĝi ne estas kreskaĵo, ne estas vivulo, ne estas bakterio, ne estas parazito, simple – „viruso estas viruso” laŭ difino de iu franca mikrobiologo. Aliflanke ekzistas multaj aliaj virusoj sen kiuj ni ne povus vivi, sed kiamaniere elekti inter ili, kiun planti kaj kiun forpreni? La decidon ni devas lasi en manoj de fakuloj – virusologoj, epidemiologoj, kuracistoj ...

Dum lastpasintaj monatoj jam komenciĝis vakcinado, ĝi estas espero, ke la pandemio kun „malutilaj” virusoj finiĝos kaj ke ni povos reveni al normala vivo. Per „normala vivo” mi celas ankaŭ agadon en esperantista medio. En pasinta jaro estis preskaŭ ĉiuj aranĝoj nuligitaj aŭ prokrastitaj. Anstataŭ personaj kontaktoj vaste disvolviĝis retaj kontaktoj, tuj aperis aŭ estas por ni aperintaj diversaj programoj, kiuj ebligas diskutadon „vizaĝo al vizaĝo” per komputiloj. Dank’al tio mi fakte neniam antaŭe partoprenis tiel multajn retaranĝojn kiel dum la lastaj monatoj – kunvenojn, prelegojn, diskutojn, seminariojn. Oni povas diri, ke tio estas pozitiva flanko de la pandemio (tamen kun profunda respekto al la danĝeraj aspektoj de ĝi).

Ankaŭ IFEF, uzante retajn rimedojn ne restis malantaŭe. La estraro abonis pro tio platformon Zoom, kiu ebligas komunajn retkontaktojn. Ideo de la abono estas tiu, ke ĝi estu uzata vaste, ne nur de la estraro, sed ankaŭ de la komitato, landaj asocioj, komisionoj, laborgrupoj. Ne hezitu kaj uzadu ĝin – pliajn informojn kun kalendaro pri planitaj retkunvenoj vi trovos en IFEF-retpaĝaro ([www.ifef.net](http://www.ifef.net)) kaj ĉe la sekretario de IFEF Vito Tornillo.

Komuniku, diskutu, prelegu laŭplaĉe - ni uzu ĉi tiun tempon de malebla persona kontakto cele al daŭra ekzistado de nia esperanta fervojista movado.

**Via redaktoro**

---

**IFEF-estraro bondeziras ĉiujn niajn kolegiojn okaze de la 8-a de Marto, Internacia Tago de Virinoj.**



**Enhavo:**

Transponta Kongreso – ĉu aŭ se jes kiel? .....	24
Tagordo de publika komitatkunveno .....	25
Tagordo por la kunveno de FK dum la 72-a kongreso .....	26
Raporto de la kasisto pri la jaro 2020 .....	27
Raporto de la IFEF-ĉefkomitatano pri la jaro 2020 .....	29
Raporto de la redaktoro .....	30
Grava perdo por ĉeĥaj esperantistoj .....	31
Zlatko Hinšt, biografio .....	32
Ladislav Hakl, biografio .....	33
Terminara laboro .....	34
Potenco de televidkomunikiloj .....	35
La Marborda Linio <i>Helsingør</i> – Kopenhago ... kaj pli .....	38
Titolpaĝo: Nuntempa la plej ofta komunikadrimedo por IFEF.	

**Internacia Fervojisto**

Dumonata fervojfaka revuo en Esperanto kaj organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)

Apero: Januaro, Marto, Majo, Julio, Septembro, Novembro

Redaktofino: La 10-a de la antaŭa monato

**Estraro de IFEF**

**Prezidantino:** Rodica Todor (Rumanio) rodica\_todor@yahoo.com

**Sekretario:** Vito Tornillo (Italio) vitorni@virgilio.it

**Kasisto:** Laurent Vignaud (Francio) laurent@ifef.net

**Redaktoro:** Ladislav Kovář (Ĉeĥa Respubliko) kovar.lad@email.cz

**Gvidanto de la Faka Komisiono:** Jan Niemann (Danio) niemann@kabelmail.dk

**Membroj de la Redaktora Komisiono**

Lene Niemann (Danio), Guido Brandenburg (Germanio), István Gulyás (Hungario), Zlatko Hinšt (Kroatio), Laurent Vignaud (Francio)

**Sekretarioj de la Faka Komisiono**

Guido Brandenburg (Germanio), [guido.brandenburg@t-online.de](mailto:guido.brandenburg@t-online.de), Terminara Sekcio  
Jaroslav Matuška (Ĉeĥa Respubliko), [Jaroslav.Matuska@upce.cz](mailto:Jaroslav.Matuska@upce.cz), Fake Aplika Sekcio

**Bank-Konto:**

**Nomo:** „Laurent Vignaud”

**IBAN:** FR33 20041 0 1011 0929 374Y 03237

**BIC:** PSSTFRPPNTE

**UEA-konto:** iffk-o

**Retejo:** [www.ifef.net](http://www.ifef.net)

**Facebook:** <https://www.facebook.com/pages/IFEF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio/726039834155372>

## **Transponta Kongreso - ĉu aŭ se jes kiel?**

Tordita kiel tiu titolo estas la prognozo rilate al la ĉirkaŭkongresaj cirkonstancoj. La viruso dominas la ĉiutagajn informojn. Ni suĉadas ĉiujn novaĵojn kaj klopodas kompletigi la puzlon, sed la bildo obstine rifuzas vidiĝi.

En IF 2021.1 ni jam anoncis niajn dezirojn – resume: kiu povas, partoprenu surloke, kiu ne povas, partoprenu rete.

La preparkomitato el GEA, PEA kaj GEFA decidis refoje oferti komunan kongreson. Rilate la daŭron kaj la kotizon nia fervojista kongreso adaptiĝas al la aliaj du. Intertempe ni kontaktis la geamikojn kiuj validigis siajn aliĝojn por la jaro 2021 kun demando kiel ili volas disponi pri siaj antaŭpagoj kaj ĉu ili planas viziton aŭ preferas retan partoprenon.

Aliaj enketoj sin turnas al la prelegantoj kaj artistoj enprogramigitaj 2020 kaj koncernas ilian pretecon kontribui en la ĉijara aranĝo. Necesas klarigi iliajn eblojn. La reto kaj la retkonferencaj programoj ofertas la ŝancon prelegi antaŭ la aŭskultantoj de ie ajn en la mondo. La publiko povas sekvi la prezenton surloke en la kongresejo aŭ same kiel la preleganto hejme antaŭ la komputila ekrano.

Inverse ankaŭ surloke prezentataj kontribuoj informaj, klerigaj aŭ distraj estas spekteblaj ie ajn en la mondo. Diskutoj kaj disputoj estas eblaj inter ĉeestantaj kaj forestantaj partoprenantoj - kondiĉo por ĉio: funkcia interreto, kamerao, mikrofono, kapaŭdiloj.

La platformo estos Zoom, la retkonferenca sistemo al kiu en la tempo de la pandemio multaj asocioj kaj entreprenoj konfidis sian internan komunikadon kaj kiu evidentiĝis kompare kvalita kaj stabila.

Ĝi permesas konstrui retejon kiel kongresejon kun ĉefa enirejo kaj vestiblo kun pordoj al salonoj, en kiuj okazas la programeroj kaj inter kiuj eblas libere elekti. Komence de Februaro la preparkomitato kun fakuloj kaj nefakuloj sukcese elprovis la praktikan funkcion de tiu modelo.

Ne transporteblaj en la reton estos la programeroj ekster la kongresejo - kiel promenoj, vizitoj kaj ekskursoj. Ĉar ekster la kongresejo la retaliro ne estas fidinda sufiĉe por kontinua transsendo, ni klopodos pri filmregistro kaj videbligo post la aranĝo.

En tiu ĉi eldono de la Internacia Fervojisto ni almetas la novan, ŝanĝitan aliĝilon.


Vi vidas tie la reviziitan provizoran programon. Ekskursoj kaj vizitoj ne estas antaŭmendebaj. La partopreno estos regulata surloke.

Ni konscias ke aliĝdecido dependas de faktoroj diversaj en ĉiuj niaj landoj kaj ne facile takeblaj el hodiaŭa perspektivo. Pro tio ni konscie rezignis pri aliĝperiodoj kaj promesas kotizrepagon, se la pandemio lastmomente fiaskigas la vojaĝplanon.

Ni volas atentigi pri tio, ke ĉiu aliĝinto de ni ricevos instrukciojn, aliran adreson kaj ŝlosilon por ebla reta partopreno. Tio okazos mallongan tempon antaŭ la aranĝo.

Ĝisdatigitajn informojn kaj retan aliĝformularon vi trovas sur la kongresa retpaĝo [www.esperanto.de/eo/ifk](http://www.esperanto.de/eo/ifk) kaj kompreneble sur la retpaĝo de IFEF [www.ifef.net](http://www.ifef.net)

Kiel funkcios la reta kongreso:



Ĉiu aliĝinto ricevos la retejan adreson kaj aliran ŝlosilon por la „Reta Transponta Kongreso“. De la enira salono kondukos apartaj pordoj al la salonoj kie okazos la programo. Ĉeestantaj kaj retaj partoprenantoj povos sekvi la programon.

**Guido Brandenburg** (nome de la Transponta Kongreso)

---

## Tagordo de publika komitatkunveno

en la 72-a IFEF-kongreso en Frankfurt/O (DE) - Słubice (PL)  
(21/24.05.2021) (aŭ rete)

1. Malfermo, konstato de la mandatoj
2. Ricevitaj telegramoj, leteroj
3. Honorigo de la mortintoj
4. Estraranaj raportoj

- 4.1. Sekretario
- 4.2. Redaktoro
- 4.3. Kasisto
5. Diskuto kasraporto-bilanco 2020/buĝeto 2022, kotizkonfirmo
6. Protokoloj IFK reta
7. Raporto de la ĉefkomitatano
8. Resumo de la jarraportoj 2020 el la landaj asocioj
9. Raportoj de la Faka Komisiono (FK)
  - 9.1 Gvidanto
  - 9.2 Sekretario Fake Aplika Sekcio (FAS), Terminara Sekcio (TS)
  - 9.3 Elekto de gvidanto kaj sekretarioj ene de FK
10. Raportoj de la komisiitoj
  - 10.1 Komitatano „A” de IFEF ĉe UEA.
  - 10.2 Fakdelegitoj de UEA
  - 10.3 Rilatoj al aliaj organizoj: FISAIC; SAT; ILEI; UMEA; ISAE; TAKE; IKEF
11. Kongresproponoj
  - 11.1 Elekto de la ĉefkomitatano kaj anstataŭanto de Ĉk
12. Analizo pri la situacio kaj la estonto de IFEF
  - 12.1 Raportoj de la laborgrupoj
  - 12.2 Strategia laborplano
  - 12.3 Situacio en kelkaj landoj
13. Venontaj kongresoj
  - 13.1 Konfirmo de la invito al la 73-a IFK en 2022 en Ĉeĥio
  - 13.2 Elekto de la lando por la 74-a IFK en 2023 (Belgio)
  - 13.3 Diskuto pri pluaj eblecoj: 2024, 2025
14. Eventualaĵoj
15. Libera diskutado

### **Vito Tornillo, sekretario de IFEF**

---

### **Tagordo por la kunveno de FK dum la 72-a kongreso**

1. Bonvenigo kaj enkonduko fare de la FK-gvidanto.
2. Elektoj:
  - a) Gvidanto de FK (nuna Jan U. NIEMANN, ne deziras reelekton).
  - b) Sekretario de FAS (nuna Jaroslav MATUŠKA, reelekteblas).
  - c) Sekretario de TS (nuna Guido BRANDENBURG, reelekteblas).

- d) Redaktoro de TeKu (nuna Guido BRANDENBURG, reelekteblas).
3. Raporto de la Fake aplika sekcio-sekretario.
  4. Raportoj pri faka laboro en unuopaj IFEF landaj asocioj.
  5. Fakaj programeroj dum la 72-a IFK.
  6. Raporto pri la Terminara (sekcia) laboro.
  7. Raportoj de la TS-kunlaborantoj (kaj landaj kaj individuaj).
  8. Trakto de nocioj laŭ informoj en Terminaraj Kurieroj.
  9. Fakaj programeroj dum la 106-a UK en Belfasto.
  10. Novaj taskoj por la sekcioj.
  11. Eventualaĵoj (sub tio korektado de la adreslisto).

**Jan Niemann, gvidanto de Faka Komisiono**

## Raporto de la kasisto pri la jaro 2020 (sumoj en eŭroj)

Enspezoj	2020	2019	Elspezoj	2020	2019
Kotizoj 2020	2 640,00	2 556,00	IF-presado	453,70	463,08
FFK-vendo		35,04	IF-sendo	285,70	286,40
Diversaĵoj		36,00	UEA-kotizo	132,00	132,00
donacoj por Historia libro 1999-2019	588,41		Propagandiloj		29,00
Ordigo malfruaj kotizoj	195,00		Estraro		557,17
			Reprezentado	84,00	821,47
			FISAIC	150,00	667,05
			Fak-eldonaĵoj	136,86	80,33
			Bankkosto	12,90	12,00
			Hist. 1999-2019	588,41	
			Subteno BAFE	100,00	
			Ordigo 2018		108,00
			ifef.net	20,40	20,40
<b>Sumo :</b>	<b>3 423,41</b>	<b>2 627,04</b>	<b>Sumo :</b>	<b>1 963,97</b>	<b>3 176,90</b>

Kotizoj: Ĝenerala malkreska tendenco restas (- 6 membroj), kvankam la enspezita kotizsumo iom pli altas ol en 2019. Temas ĉefe pri pli da membroj, kiuj petis paperan ricevon de la bulteno.

Notindas ankaŭ, ke fondiĝis 2 landaj asocioj (Belgio kaj Hispanio) sed tio preskaŭ ne influis la kotizsumon (individuaj membroj plu estas membroj, ne individue sed pere de sia landa asocio).

Elspezoj: Pro la pasintjara pandemio, multaj kunvenoj ne okazis (ne okazis fizikaj estrar-kunvenoj, nek partopreno de IFEF-estraranoj en kunvenoj de aliaj asocioj).

FISAIC: Por 2020, la sumo temas nur pri la IFEF-kotizo al FISAIC, dum en 2019 estis ankaŭ subteno al IFEF-estrarano sekretario de FISAIC.

BAFE: La sumo temas pri helpo por enlandaj sendokostoj.

Bilanco je la 31-a de decembro 2020					
Aktivoj	2020	2019	Pasivoj	2020	2019
Banko	306,29	934,26	Fondusoj diversaj	3 871,86	3 880,86
UEA-konto	11 152,12	11 266,12	„Historia libro (IFEF 100 jaroj)“	1 459,29	2 047,70
Kaso	3 545,56	2175,56	jarrezultoj sumigitaj	8 195,38	8 745,24
Ricevotaj kotizoj (malfrue)	165,00		ĉijara rezulto	1 459,44	-549,86
			ŝuldo IFEF pagota en 2021	84,00	
			antaŭricevitaj kotizoj	99,00	252,00
<b>Sumo :</b>	<b>15 168,97</b>	<b>14 375,94</b>	<b>Sumo :</b>	<b>15 168,97</b>	<b>14 375,94</b>

Ĉi-jara rezulto: La "granda" profito spegulas la neaktivecon de IFEF dum la jaro 2020. Ja krom eldonado (bulteno, Historia Libro 1999-2019, FervojFaka Kajero n°28) okazis nur enretaj senpagaj renkontiĝoj. Do same kiel fine de la antaŭaj jaroj, restas sufiĉa monrezervo.

Propono de buĝeto por la jaro 2022			
Enspezoj	EUR	Elspezoj	EUR
Kotizoj	2500,00	IF-presado	450,00
FFK-vendo	20,00	IF-sendo	300,00
		UEA-kotizo	132,00
		Estontaj agadoj/Reprezentado	800,00
		FISAIC	150,00
		Estraro	516,00
		Bankkostoj	20,00
		Fak-eldonaĵo	130,00
		ifef.net	22,00
<b>Sumo :</b>	<b>2 520,00</b>	<b>Sumo :</b>	<b>2 520,00</b>

Laurent Vignaud

Raporto de la IFEF-ĉefkomitatano por la jaro 2020



Dum la jaro 2020 la ĉefkomitatano intense laboris je kampo de rilatoj inter landaj asocioj kaj IFEF. La 8-an de Januaro mi sendis al reprezentantoj de LA-j (prezidantoj, komitatanoj kaj anstataŭantoj de komitatano) kun akompana letero cirkuleron de la ĉefkomitatano n-ro 1/2020. La cirkulero enhavis demandilon kun kelkaj aldonoj al la demandoj. Dua sendo de cirkulero kun nova akompana letero/mesaĝo okazis la 1-an de Marto 2020, post fino de limdato por sendi plenigitajn demandilojn kun la jarraportoj de la LA-j pri la jaro 2019 ĝis fino de Februaro. Ĝis tiam siajn jarraportojn sendis nur 8 LA-j. Sekvis novaj sendoj tria, kvara kaj kvina la 3-an de Aprilo 2020 kaj post tio ĝis la 15-a de Aprilo ĉefkomitatano sukcesis ricevi entute 13 jarraportojn de LA-j: Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Ĉeĥio, Danio, Francio, Germanio, Hungario, Italio, Kroatio, Pollando, Rumanio kaj Slovenio. Belgio kiel BAFE ne plenigis mem demandilon sed en libera formo informis mallonge pri komenco de sia agado en la jaro 2019. Ne sendis jarraportojn Ĉinio kaj Kubo. Do, en la jaro 2019 estis 15 LA-j. Pri tio mi informis la 15-an de Aprilo 2020 estraranojn kaj aliajn funkciulojn de IFEF en mia „Provizora mallonga raporto de ĉefkomitatano pri jarraportoj de landaj asocioj por la jaro 2019 surbaze de demandilo“. Mi estis en konstantaj kontaktoj kun sekretario Vito Tornillo kaj kasisto Laurent Vignaud pro eventualaj plusendoj de ricevitaj jarraportoj. La sekretario jam la 16-an de Aprilo 2020 surbaze de ricevitaj LA-jarraportoj finis sian „Resuman jarraporton de la landaj asocioj de IFEF pri la jaro 2019“ kaj sendis ĝin al estraranoj kaj aliaj funkciuloj. Ankaŭ mi faris mian „Raporton de la ĉefkomitatano de IFEF por la jaro 2019“ kiel unu el la dokumentoj en la nelokdependa storsistemo *Google drive* kiun instalas la IFEF-sekretario por la voĉdonado dum virtuala plenkunsido. Ili estis dissenditaj la 15-an de Majo 2020, anstataŭ analoga proceduro dum IFEF- kongreso, kiu pro pandemio ne okazis en la jaro 2020 en Frankfurt (Oder)/ Słubice. La kasisto surbaze de LA-jarraportoj pretigis sian tabelon pri membrara statistiko en la jaro 2019 kaj ĝisdatigis la IFEF-adresaron 2020, unuan version de la 22-a de Majo kaj duan la 7-a de Julio 2020. Mi laŭ peto de la IFEF-prezidantino transprenis la taskon por ordigi adresaron per cirkulero de ĉefkomitatano. Duan version de Laurent Vignaud kiu ĝis tiam zorgis pri la adresaro, mi faris kun modifoj. Ĉi-tiuj detaloj estis

pretaj jam en Septembro, sed prezidantino Rodica Todor deziris prokrasti la dissendon pro la jarkunvenoj de germana, franca, ĉeĥa kaj hungara landaj asocioj en aŭtuna periodo. Pro tio mi atendis tion ĝis la 26-a de Novembro 2020 kiam mi sendis al reprezentantoj de LA-j cirkuleron de ĉefkomitatano n-ro 2/2020 kaj la IFEF-adresaron 2020. Anstataŭanto de ĉefkomitatano plusendis ilin al individuaj membroj. Sekvis tria cirkulero de ĉefkomitatano n-ro 3/2020 la 31-an de Decembro al reprezentantoj de LA-j kaj individuaj membroj pri elektoj por funkcioj de gvidanto de Faka Komisiono kun revalidigoj de ĝiaj du sekciaj sekretarioj kaj elektoj de ĉefkomitatano kaj anstataŭanto de ĉefkomitatano. Tiam finiĝis mia laboro en la jaro 2020.

**Zlatko Hinšt, IFEF-ĉefkomitatano**

---

## **Raporto de la redaktoro**

En la jaro 2020 aperis entute ses numeroj de la revuo Internacia Fervojisto kun entute 128 paĝoj kaj 71 artikoloj aŭ raportoj, sciigoj ktp. Inter la plej oftaj temoj, kiuj aperis en la revuo estis teknikaj artikoloj – entute dekdu kazoj, aliaj sep estis raportoj, po ses – informoj pri kongreso, nekrologoj, informoj pri diversaj aranĝoj kaj amuza anguleto. Kvin artikoloj temis pri vojaĝado, same kiel pri koronavirusaj temoj, kvar kontribuaĵoj estis vortoj de la redaktoro, tri pri terminologia laboro kaj interesaĵoj, po du informis pri IFEF-laboro, agado de landaj asocioj kaj biografioj. Unu artikolo priskribis psikologiajn problemojn kaj historion. Je la enhavo de pasintjara kolekto de la Internacia Fervojisto partoprenis 19 aŭtoroj. Estas laŭdirinde, ke al la variospeca enhavo kontribuis ankaŭ multaj novaj aŭtoroj, ekz. K. Kovač, W. Ullmann, H. Rodriguez kaj aliaj. Sur ĉi tiu loko mi volas sincere danki al ĉiuj, kiuj prezentis siajn artikolojn en pasintjara IF-kolekto.

Speciala danko apartenas al Redaktora Komisiono, kiu multe helpis al mi en fina precizigo kaj gramatika purigo de la tekstoj. Tiu laboro ĉiam forprenas multe da tempo kaj sen ĝi la enhavo de la revuo ne estus perfekta.

**Ladislav Kovář, redaktoro de IF**

Transporta Esperanto-Kongreso  
germana - pola - fervojista



Frankfurt (O) / Słubice  
21-a – 24-a de Majo 2021



# ALIĜILO

por la 72-a kongreso de IFEF  
21-a ĝis 24-a de Majo 2021  
*Frankfurt (Oder), Germanio*  
*Słubice, Pollando*

Retadreso por aliĝiloj:  
[ifk.aligo@esperanto.de](mailto:ifk.aligo@esperanto.de)

**LKK-adreso:** BSW-Ortsstelle Werk Kassel  
Freizeitgruppe Esperanto  
Frasenweg 20-36  
DE-34128 Kassel (Germanio)

**Kongresa retpaĝo:** <http://www.ifef.net>

Familia nomo	Persona nomo	Naskiĝdato
Adreso		
Hejma Telefono:	Poŝtelefono:	
Ret-adreso:		
IFEF-ano    jes    /    ne        viro    /    virino        (trastreku aŭ nuligu ne taŭgajn)		

## Partopreno reta

Por reta partopreno estos uzata la retkonferenca programo Zoom. Bezonata estas komputilo kun aliro al interreto, kamerao kaj kapaŭdilo kun mikrofono (pri minimumaj postuloj pri sistema programaro informas la Zoom-helpcentralo).

Por eniri la virtualajn kongresejajn salonojn ni ĝustatempe sendos alirŝlosilon diversajn instrukciojn al la retpoŝta adreso de vi indikita supre.

La reta partopreno estas senkotiza.

## Partopreno surloka

Kotizo en Eŭro			pago
<b>IFEF-membro</b>	A-landano (laŭ UEA)	<b>60</b>	
	A-landano (laŭ UEA), familiano, junulo sen enspezoj	<b>30</b>	
	B-landano (laŭ UEA)	<b>45</b>	
	B-landano (laŭ UEA), familiano, junulo sen enspezoj	<b>25</b>	
<b>ne IFEF-membro</b>	A-landano (laŭ UEA)	<b>90</b>	
	A-landano (laŭ UEA), familiano, junulo sen enspezoj	<b>60</b>	
	B-landano (laŭ UEA)	<b>65</b>	
	B-landano (laŭ UEA), familiano, junulo sen enspezoj	<b>45</b>	
Libervola donaco al la kongresa kaso			
			fina sumo

### Kongresa konto:

Konto: Andreas Diemel IFEF Ffm GEFA

IBAN: **DE16 5009 0500 0000 9537 29**,

BIC: **GENODEF1S12**

Pagocelo: **72-a IFK antaŭnomo, nomo**

- Ĉiu partoprenanto bonvolu pleniĝi kaj sendi apartan aliĝilon por la kongreso al la retadreso [ifk.aligho@esperanto.de](mailto:ifk.aligho@esperanto.de)
- Sendu la pagon al la indikita banko-konto de GEFA. Oni traktos la aliĝon nur subskribitan kaj nur post alveno de la pago.
- Se vi pagas por alia persono, kiu nepre devas sendi apartan aliĝilon, menciuj precizajn informojn pri la koncerna persono: nomon, landon, kompletajn kontaktadresojn.
- La kongreskotizo estos repagata se la malmendo okazas pro vojaĝmaleblo kaŭzita de infektoprojekta regularo, kondiĉe ke LKK ricevos la malmendon ĝis la 30-a de Aprilo antaŭ la kongreso.
- LKK konfirmos per konfirmilo la akcepton de ĉiu aliĝilo – por partopreno reta tuj, por partopreno surloka post la ricevo de la koncerna pago per indiko de via kongresa numero.
- LKK havas la rajton ŝanĝi la prezojn pro granda inflacio aŭ se aliaj neantaŭvideblaj kondiĉoj postulus tion.
- Mi konfirmas, ke mi konsentas kun la ĝeneralaj instrukcioj presitaj en ĉi tiu aliĝilo kaj aparte deklaras, ke mi havas san- kaj akcident-asekuron por mia restadperiodo en Frankfurt (Odro) /Stubice (Germanio, Pollando)
- Mi konsentas / ne konsentas, ke mia retadreso aperu en la kongresa libro (forstreku ne-taŭgan indikon).
- Invito al partoprenonto ekster Eŭropa Unio estos sendata nur post ricevo de subskribita aliĝilo.

Loko, dato:

Subskribo:

.....

.....



## Kiel atingi la kongresurbojn *Frankfurt Oder / Slubice?*

### Aviadile

Flughaveno *Berlin-Brandenburg (BER)*

de flugstacioj 1,2 kaj 5 per regiona metroo S9 (*Spandau*), de flugstacioj 1 kaj 2 per regiona eksprestrajno RE7 (*Dessau*), aŭ regiona trajno RB14 (*Nauen*), aŭ flughavena eksprestrajno FEX ĝis stacio *Ostkreuz*, de tie per regiona eksprestrajno RE1 (*Frankfurt/Oder*) al *Frankfurt( Oder)*

### Trajne

de okcidento per longdistanca trajno (direkto *Pollando, Warschau*) al *Frankfurt (Oder)*


aŭ per regiona eksprestrajno RE 1 (*Frankfurt/Oder*) al *Frankfurt (Oder)*

de oriento per longdistanca trajno (direkto Germanio, *Berlin*) al *Frankfurt (Oder)* aŭ per regionaj trajnoj sporadaj de *Zielona Gora* aŭ *Rzepin (Frankfurt/Oder)* al *Frankfurt (Oder)*

### Surstrate

de okcidento: aŭtoŝoseo (BAB) A12 -> *Frankfurt (Oder), Mitte*

de oriento: aŭtoŝoseo A2 -> (BAB) A12 -> *Frankfurt (Oder), Mitte*



### Fakprelegoj

Ni intencas prezenti fervojtemajn fakprelegojn en du blokoj. Interesuloj estas petataj sendi resumon al la gvidanto de la Faka Komisiono ([niemann@kabelmail.dk](mailto:niemann@kabelmail.dk)) kaj al LKK ([ifk@esperanto.de](mailto:ifk@esperanto.de)) ĝis plej malfrue la 31-a de Marto 2021.

## Grava perdo por ĉeĥaj esperantistoj

Dum monato Januaro 2021 forlasis niajn vicojn du eminentaj fakuloj. Per ĉi tiuj linioj mi volas en la nomo de ĈeFEA memori pri ili kaj esprimi nian malĝojon pro ilia forpaso.



### **Doc.ing. Jan Werner** (05.02.1933 – 20.01.2021)

Inĝeniero Jan Werner eminenta fakulo pri konstrutekniko, li laboris ĉe konstruado de gravaj metalurgiaj fabrikoj. Pro siaj politikaj opinioj li estis persekutita. Post la "velura revolucio" li revenis al teknika universitato en Brno kie li docentiĝis. Dum tuta sia vivo li estis entuziasma esperantisto, li aktivadis en junulara movado, terminologia verkado, li aktive gvidis Scienc-teknikan sektion de Ĉeĥa Esperanta Asocio. Li ankaŭ helpis la terminologian laboron en IFEF per siaj spertoj kaj konsiloj. En la 90-aj jaroj li publikigis kelkajn artikolojn en FervojFakaj Kajeroj kaj lingve korektis ilin.

### **Inĝ. Ivo Laníček** (24.09.1937 – 21.01.2021)

Profesio de inĝeniero Ivo Laníček estis sekuriga kaj komunikada tekniko ĉe fervojo. Dum sia profesia vivo li fariĝis agnoskita fakulo, li laboris en gravaj funkcioj en diversgradaj fervoj-administracioj, ministerio por fervojtrafiko kaj kiel reprezentanto de Ĉeĥoslovaka Ŝtata Fervojo en Komitato de Organizaĵo por fervoj-kunlaboro (OSŽD) en Varsovio.



Por esperantistoj li estas konata kiel multjara kaj entuziasma membro de nia asocio, kvankam li ne parolis esperante. Dum jarkonferencoj de la asocio li ofte prelegis pri sia laboro en FISAIC, kie li estis prezidanto de Internacia teknika komisio de FISAIC por filmo kaj video.

**Ladislav Kovář**

**Zlatko Hinšt, biografio**

Mi naskiĝis la 25-an de Aprilo 1954 en Zagreb kie mi akiris tutan edukadon, laboris kaj agadas.



Mi diplomiĝis en Ekonomika fakultato (1977) kaj en Filozofia fakultato de Universitato en Zagreb (grupoj de sociologio kaj filozofio) – (1980). Poste mi magistriĝis pri sociologio kaj faris studojn pri socia ekologio (1993) en Filozofia fakultato en Zagreb. Ankaŭ mi doktoriĝis kun titolo doktoro de sociaj sciencoj je la kampo de ekonomiko (dr. sc.) en Ekonomika fakultato en Zagreb (2002). Dum AIS-sesio en Sibiu mi akiris titolon de doktoro pri humansciencoj (Dr. sc. hum) - (2011). Mi

estas asociita docento (ADoc.) de humanistiko por la fako ekonomiko de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS).

Pli ol 35 jarojn li laboris en diversaj organizoj de kroataj fervojoj en Zagreb (1977-2014), kiel fakulo por analizoj kaj esploroj pri ekonomiaj kaj sociaj aferoj de fervoja entrepreno kaj trafiko. Mi estis siatempe kunlaboranto en projekto kun studo pri „Strategio de disvolviĝo de fervoja trafikaj sistemo en Respubliko Kroatio“. Nun mi estas pensiulo.

Mi estas aŭtoro de multaj sciencaj kaj fakaj artikoloj (pli ol cent), kun temoj pri trafika ekonomiko kaj ekonomiaj analizoj, fervojo kaj socia ekologio, ofte preleginta en simpozioj kaj prezentis ankaŭ multajn librojn el sociaj sciencoj, precipe de sociologio, kaj aliaj diversaj temoj. Krom tio mi faris tradukojn el Esperanto al kroata lingvo, ĉiuj publikigitaj en nacilingvaj sciencofakaj revuoj kaj kolektoj de laboraĵoj. Mi prelegis dum Sanmarineca Universitata Studadsesio (SUS) de AIS kaj en seminarioj pri Apliko de Esperanto en profesiaj agadoj (AEPa) ĉe filio AIS Bulgario. Mi ankaŭ estas aktiva en kadro de kongresoj de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEf) kun fakaj prelegoj, verkas artikolojn pri fervoj-faka terminologio kaj pri spertoj de fervojoj kaj el trafiko, iuj aperintaj en „FervojFakaj Kajeroj“. Plimulto de esperantlingvaj prelegoj/artikoloj rilatantaj al ekonomiaj analizoj, statistiko kaj aplika interlingvistiko kun ekonomika sciencofaka terminologio aperis en retejoj de Internacia Komerca-Ekonomia



Federacio (IKEF) kaj Eventoj (STEB). Aliaj estas publikigitaj en tri jareldonoj de Jarkolekto de TAKE – Tutmonda Asocio de Konstruistaj Esperantistoj, kaj en aliaj publikaĵoj.

Mi estas membro, multjara vicprezidanto kaj preleganto pri faktemoj en la Kroata Fervojista Esperanto-Asocio (membro ekde la jaro 1981) kaj komitatano kaj anstataŭanto de komitatano de KFEA en IFEF kaj ankaŭ IFEF-ĉefkomitatano ekde 2018. Ankaŭ mi estis multjara delegito de fervojistoj-esperantistoj kaj membro de prezidantaro en Kroata Esperanto-Ligo (KEL).

Mi estas ĉefkomitatano ekde Majo 2018 kaj finos mandaton en Majo 2021. Mi deklaras min preta rekandidatiĝi kiel ĉefkomitatano de IFEF kaj plenumadi miajn taskojn en sekvontaj tri organizaj jaroj 2021-2024.

**Zlatko Hinšt**

---

## Ladislav Hakl, biografio



Mi naskiĝis la 25-an de Februaro 1974 en urbo Pardubice. Inter la jaroj 1988-1992 mi vizitadis Trafikan fervojistan mezlernejon en Česká Třebová, en fako „Sekuriga kaj telekomunikada tekniko“ kaj finis ĝin per maturekzameno. Ekde la 1-a de Januaro 1994 mi laboris en firmao *České dráhy*/Ĉeĥaj fervojoj. Post diversaj ŝanĝoj mi nun laboras en firmao Správa železnic (Fervojadministracio), en sama profesio - bontenado de sekuriga kaj telekomunikada tekniko en stacio

Pardubice.

Esperanton mi komencis lerni kiel memlernanto. Ekde la jaro 2007 mi estas membro de IFEF kaj Ĉeĥa Fervojista Esperanto-Asocio (ĈeFEA) – komitatano de la asocio ekde 2017. En 2012 mi membriĝis en la Terminara kaj la Fake Aplika Sekcioj. Dum la 63-a IFK en Liberec mi kunlaboris en LKK. Plie mi estas membro de Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice kaj ekde 2020 - individua membro de UEA.

Mi estas anstataŭanto de la ĉefkomitatano en periodo de tri organizaj jaroj 2018-2021. Mi rekandidatiĝas por la sama funkcio kaj mi estas preta plenumadi taskojn de anstataŭanto de ĉefkomitatano por la sekvontaj tri organizaj jaroj 2021-2024 (kun komenco kaj fino en ambaŭ jaroj en monato de okazado de koncernaj kongresoj).

**Ladislav Haki**

---

## **Kontraŭrampilo en la balasto**

### **Ĉu necesas nova labormaniero en la Terminara Sekcio?**

La Terminara Sekcio de IFEF (TS) donis al si la taskon flegi kaj pluevoluigi Esperanton kiel fervojan faklingvon. Tio estas nenio nova. Ĝi sekvas la tradicion de internacia terminologia laboro ligita al la nomoj Ritterspach, Bácskai, Engen, Krogstie, Zupanić, Blondeaux, Hartig, Hoffmann kaj multaj pliaj. Ĝi fariĝis institucio konata kaj agnoskita en la rondo de la lingvaj kunlaborantoj de UIC, la Internacia Fervojunio.

La laboron ene de la TS signife ŝanĝis en la jaro 1976 la enkonduko de la Terminara Kuriero. Ĝi servas kiel diskutbazo pri novaj aŭ korektendaj difinoj kaj terminoj. Ĝi direktas sin al laŭeble granda grupo de fervojaj fakuloj parolantaj Esperanton kaj tiel helpas plenumi la taskon kiun la kreinto de Esperanto donis al la parolantoj, nome uzi la lingvon, sed ankaŭ komune vastigi ĝian aplikon kaj adapti ĝin al la bezonoj de la tempo.

Ĉiu el ni fervojaj fakuloj havas sian personan perspektivon dependan de scioj kaj spertoj el laboro en, pri aŭ por la fervojo. Mi mem aktivis en la sekcio pri signaltekniko de la germana fervojo. Se temis pri grundo, betono kaj statiko mi devis fidi al la fakuloj laborantaj en la koncernaj sekcioj. Nun klopodante pri taŭgaj fakesprimoj la afero estas tute sama. Mi dependas de funkcia partopreno en la TS kaj de la konsiloj de la fakuloj.

La Terminara Kuriero – ankaŭ la eldono 158 aperinta en Novembro 2020 - estas dissendata al 35 retadresoj de TS-membroj. Unu el la alskribitoj investis la tempon por komenti terminproponojn kaj difintradukojn kaj aldonis kelkloke alternativojn. Mi estas tre danka pro tio. Sed mi ne

povas anticipi, ke ni du personoj reprezentas la opinion de la fervojfakuloj en IFEF kaj daŭrigi la laboron.

Eble la Terminara Kuriero ne plu estas taŭga rimedo por kumuli niajn konojn. Eble diskuto en retkonferenco estus pli konvena. Ĝi similus la kunvenojn de la TS enkadre de la Internacia Fervojista Kongreso. IFEF eksperimentas per Zoom, la sistemo kiu furoras aktuale pro vasta uzo en la koronavirusa pandemio. La estraro aĉetis jaran abonon kaj disponigas ĝin al siaj institucioj. Mi proponas akcepti tiun oferton. Se vi havas retaliron, komputilon, kameraon kaj kapaŭdilon kun mikrofono kaj se vi havas intereson, tiam mi petas vian anoncon al la TS-sekretario (retpoŝta adreso: [guido.brandenburg\(ĉe\)t-online.de](mailto:guido.brandenburg(ĉe)t-online.de)).

Zlatko Hinšt, la IFEF-ĉefkomitatano, dissendis la jarraportajn enketilojn en kiuj li demandas interalie pri kunlaborantoj en la Terminara kaj la Fake aplika Sekcioj. Mi emfazas la gravecon de aktiva vivo ĝuste en tiuj grupoj. Se vi konas kolegon interesigeblan, alparolu lin aŭ ŝin aŭ peru al ni kontakton. La kvaliton de la terminara laboro esence influas la nombro de la kunagantoj.

**Guido Brandenburg**

---

## **Potenco de televidkomunikiloj**

En Novembro kaj Decembro 2020 en Italio aperis pluraj okazoj reklami Esperanton en radio, televido, gazetoj kaj kinejo, ne planitaj de esperantistoj. La unua evidenta rezulto estis la pliiĝo de informpetoj pri Esperanto, deko da aliĝoj al la reta kurso de FEI (Itala E-Federacio) "KIREK" kaj tre alta nombro da "ŝatklakoj" kaj spektantoj pri afiŝoj pri ĉi tiuj eventoj, multe pli altaj ol la averaĝaj (de 500 ĝis ĉirkaŭ 7000) kaj la *Facebook*-paĝon cent novaj homoj sekvas.

Laŭvice ili estas:

Pluraj intervjuoj kun 94-jaraĝa Norma Cescotti, instruistino de Esperanto (kiu nuntempe prizorgas la interretan kurson) fare de: loka gazeto, nacia teleĵurnalo "*TG1 RAI*" je la 20-a horo, la 24-an de Novembro; loka televido "*Trentino TV*" kaj privata nacia televido "TV2000".

La peto traduki al Esperanto kaj dubli la tekstojn de la filmo "Hazarda vivo de anarkiisto" ("*Vita accidentale di un anarchico*"). Temas pri la vivo de Giuseppe Pinelli, anarkiisto, fervojisto kaj esperantisto.

La reklamado pri la apero, sur la platformo "Netflix", de la filmo "*L'isola delle Rose*" (Insulo de la Rozoj) elsendita en naciaj televido, radioj kaj ĵurnaloj. La 9-an de Decembro la filmo estis videbla en televido kaj fascinis kaj scivolemigis multajn homojn.

La radioelsendo pri la vivo de Zamenhof en la nacia radio *RAI-Radio3* la 15-an de Decembro, prezentita de profesoro Davide Astori. Ĉiuj tiuj neatenditaj eventoj alportis grandan reklamon al Esperanto en Italujo. Jen kelkaj informoj kaj ligoj por spekti bildojn kaj videojn.



Norma Cescotti, instruistino de Esperanto en Trento, ne povanta fari kursojn en klubejo pro la pandemio je la aĝo de 94 jaroj, malkovras ke ŝi povas fari ĝin interrete sur la platformo Zoom. Do ŝi lernis uzi la programon kaj preskaŭ ĉiutage konektiĝas kun siaj gelernantoj. Tio scivoligis lokan

ĵurnaliston kiu intervjuis ŝin kaj aperigis longan artikolon en la gazeto de Trento. Ĝi atingis ankaŭ ĵurnalistojn je nacia nivelo kaj tuj poste ŝi estis en nacia televido.

<https://vimeo.com/483475454>

[https://www.trentinotv.it/video\\_on\\_demand.php?id\\_menu=268](https://www.trentinotv.it/video_on_demand.php?id_menu=268)

Pino - *Vita accidentale di un anarchico* (Hazarda vivo de anarkiisto)

La eventoj kiuj kondukis al lia morto komenciĝis la 12-an de Decembro 1969, kiam bombo eksplodis en banko de *Piazza Fontana*, centra placo en Milano, mortigante 16 homojn. Sen iu ajn pruvo, la polico tuj suspektis la milanajn anarkiistojn, kaj preskaŭ ĉiuj anarkiistoj estis provizore arestitaj kaj portitaj al la policejo. Inter ili estis Giuseppe Pinelli. Tri tagojn poste, Pinelli mortis noktomeze falante de la kvara etaĝo de la policejo tra malfermita fenestro. Policestro tuj deklaris, ke



temis pri mem-mortigo, sed sekve oni konkludis ke tiu versio ne estas kredinda, kaj ke la polico evidente mortigis Pinelli.

Filmo: <https://ghirat.vhx.tv/packages/pino-vita-accidentale-di-un-anarchico/videos/pino-stream>

Pri li: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Giuseppe\\_Pinelli](https://eo.wikipedia.org/wiki/Giuseppe_Pinelli)

La reĝisoro de la filmo kontaktis la Esperanto-asocion de Milano por fari la dubladon de la filmo en Esperanto, ili diris ke eĉ Giuseppe estus feliĉa!



En la filmo la filino de Giuseppe rakontas pri la unua renkontiĝo inter li kaj Licia (lia edzino): "Miaj gepatroj renkontiĝis en kurso de Esperanto, lingvo kreita por favori dialogon inter popoloj. Ĝi reflektis iliajn ideojn pri paco kaj egaleco. Li jam

scipovis Esperanton, sed volis daŭrigi la studadon por instrui ĝin. La unuan tagon, kiam Licia ĉeestis la kurson, la instruistino demandis ŝin, kial ŝi volas studi tiun lingvon: "Ĉar se homoj el diversaj landoj povus paroli inter si, eble estus malpli da militoj." Pino rigardis ŝin, sidiĝis apud ŝi kaj de tiu momento ili por ĉiam restis kune."

*Isola delle Rose*, multaj jam konas la historion de ĉi tiu insulo, kiu la 1-an de Majo 1968 estis memproklamita sendependa ŝtato kun la nomo en Esperanto "Esperanta Respubliko de la Insulo de la Rozoj". Ĝi konsistis el la artefarita platformo (laŭ amplekso de 400 kvadrataj metroj) starigita en la Adriatika maro, fronte al Rimini, 500 metrojn ekster la italaj teritoriaj akvoj, de la bolonja inĝeniero Giorgio Rosa (1925-2017).

La 9-an de Decembro 2020 la filmo aperis sur la platformo de filmoj en reta dissendo (*streaming*) *Netflix*, ĉar ne estis ebla la prezento en kinejoj, "La nekredebla historio de la insulo de la Rozoj". La "Respubliko", al kiu estis donita oficiala lingvo (ĝuste Esperanto), registaro, monunuo, kaj estis eldonitaj poŝtmarkoj, neniam estis formale kaj oficiale rekonita de iu ajn lando de la mondo kiel sendependa ŝtato. La platformo estis parte detruita de la itala

mararmeo, per eksplodaĵoj, la 1/3-an de Februaro 1969, sed la strukturo rezistis, kaj dronis nur la postan 26-an de Februaro, pro ŝtormo.

La filmo estas prezentita en la itala, sed subtitolita en multaj lingvoj, kaj jam estis vidita de multaj homoj tra la mondo.

En la filmo Esperanto estas menciita dufoje, en rilato kun la oficiala lingvo de la insulo kaj, krome, la enira tabelo al la insulo estas en Esperanto. Poste ĝi reaperas en gazetaj eltondaĵoj, kiuj ne estas menciitaj pro la lingvo, en la finaj titoloj, kaj en fotoj de poŝtmarkoj kaj aliaj memoraĵoj.

Mi multe ŝatis ĉi tion, ĉar Esperanto estis citita por tio kio ĝi estas, nenia retoriko por aŭ kontraŭ, kaj tio fascinis multajn homojn, ĝis nun ĝi estas la filmo plej spektata en *Netflix*, kaj tutcerte ĝi estos kandidata por kelkaj premioj en filmkonkursoj.

eo.wikipedia.org/wiki/Insulo\_de\_la\_Rozoj

<https://www.liberafolio.org/2020/12/11/esperanto-aperas-duonkase-en-filmo-de-netflix/>

Vivo de Zamenhof

*RAI-radio3*, ŝtata radio je nacia nivela elsendo, elsendis (kulturan) programon, dum ĉirkaŭ 20 minutoj, pri la vivrakonto de Zamenhof, la 15-an de Decembro, ĝuste en la festotago de Zamenhof. Davide Astori, universitata profesoro kiu okupiĝas pri esperantologio en Italio, prezentis la rakonton, akompanata de muziko kaj komentoj.

<https://www.raisplayradio.it/audio/2020/12/WIKIRADIO---Ludwik-Lejzer-Zamenhof-0a23ae8a-eb9e-45b3-a65c-7e960e1d75aa.html>


Do kion diri? Ni klopodas trovi la rimedojn kaj manierojn reklami Esperanton, ofte sensukcese. Kaj, tute hazarde, venas de ekstere neatenditaj eventoj, kiujn ni per nia propra forto neniam povintus organizi.

**Vito Tornillo**

---

### La Marborda Linio *Helsingør*-Kopenhago ... kaj pli ...

En 2000 la Marborda Linio *Kystbanen* inter *Helsingør* kaj Kopenhago plilongiĝis al la flughaveno *Kastrup*, per la ponto al *Malmö* kaj pluen en Svedion, kiel indikas la mapo. Ekde tiam la navedantoj, kiuj uzas tiun itineron, unu el la vere dense trafi-kataj linioj en Danio, povas veturi




rekte de *Helsingør* al la flughaveno. Estas grave por multaj, kiuj iras labori, sed ankaŭ por multaj, kiuj iras ferii kaj forlasis Danion de la flughaveno. Same estas multaj svedoj, kiuj laboras en Kopenhago ... per la ponto oni ja volis instigi al „*Öresund-regiono*” (komerce, kulture kaj tiel plu),

kaj fakte efektiviĝis.

Sed tiu ebleco veturi *Helsingør* – Kopenhago - *Malmö* eble ne restos ...

La pasaĝeroj vivis kun multaj malfruiĝoj kaj nuligoj dum la pasintaj jaroj, kaj oni multe diskutis pri la kaŭzo de la ĉiamaj problemoj – kaj kion fari por plibonigi la servon. Ofte sonis voĉoj, ke estas vere malfacile samtempe teni en funkcio navedan linion *Helsingør-Kastrup* kaj komparajn liniojn al ekz-e *Kalmar* kiuj kaŭzas multajn malfruojn. Precipe dum la vintroj estas multaj problemoj.



Nun okazas io. Politika decido signifas, ke la trajnoj ekde 2022 ne plu veturos la tutan vojon al la flughaveno *Kastrup*, kiel nun, kaj kiel indikite sur la mapo.

„Ne nur tiuj, kiuj loĝas proksime al la fervojlino estas trafitaj de tio. Ankaŭ homoj, kiuj iras per buso al la fervojstacio kaj pluen al la flughaveno por iri ferii, malhavos tiun eblecon.” Tion diras la urbestro

en *Helsingør*, Benedikte Kiær. Kune kun kvin aliaj urbestroj en Norda Selando kaj la estro de la ĉefurbregiona konsilantaro Benedikte Kiær sendis publikan leteron al la ministro pri transporto. Kune ili priskribas la malplibonigon, kiun *Kystbanen* nun alfrontas.


La antaŭviditaj ŝanĝoj ne nur rilatas al la ebleco rekte veturi al la flughaveno. Ili ankaŭ signifas, ke veturos malpli da trajnoj de la nordselandaj stacioj, precipe la „sudaj” sur la linio (*Vedbæk, Skodsborg, Klampenborg*). Kaj la urbestroj timas, ke tio donos eĉ pli da trafiko sur la aŭtoŝoseo kaj sekve pli grandan ŝarĝon de la klimato.

La transportministro bedaŭras, ke necesas tiuj novaj horaroj. Aliflanke li esperas, ke la trajnoj, kiuj veturos laŭ la nova horaro, veturos ĝustatempe. Li anoncas, ke la registaro laboros por havi denove rektan konekton al la flughaveno en 2025.

**Kompilis: Jan kaj Lene Niemann**

Fonto: *Berlingske søndag* 27/11-2020.

### Amuza anguleto



Interŝanĝu kvarliterajn kvadratojn en la piramido tiel, ke vi povos legi linie proverbon.

Preparis: Ivan Potiška

Solvo el pasinta numero de IF: NIN ĈIAM RAVAS KION NI NE HAVAS